

# La Esperantisto.

BIBLIOTEK  
Hector Hoc

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des **Dr. Esperanto** (Dr. L. Samenhof) von **Chr. Schmidt**, Vorstand des Welt-sprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de **Dr. Esperanto** (Dr. L. Zamenhof) eldonata de **Chr. Schmidt**, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

Kosto 1 marko por ¼ de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petitlinio.

Nr. 3.

Nürnberg, 20. Dezember 1889.

1. Jahrgang.

## Internationale Verbindung der Esperantisten.

Die Leser werden sich erinnern, dass ich das Schicksal unserer Sprache in die Hände des Kongresses legte, zu dessen Berufung die American Philosophical Society die Anregung gegeben hat, weil ich nicht die ganze Verantwortung für das Geschick unserer Sprache auf mich nehmen will. Aber bereits sind mehr als 1½ Jahre vergangen und der Kongress hat sich bedauerlicher Weise immer noch nicht verwirklicht und wird vielleicht infolge der Gleichgiltigkeit der Gelehrten ganz und gar nicht zustande kommen. Während dieser Zeit war unsere Sache ohne Führer. Obwohl man sich von verschiedenen Seiten mit diversen Vorschlägen an mich wandte, so habe ich doch nicht das Recht, die gemachten Propositionen anzunehmen oder abzulehnen und die Sprache nach meinem Gutdünken zu verändern. Wenn ich mich selbst in bezug auf unsere Sprache als massgebend hinstellen und diese jederzeit nach meinem eigenen Willen ändern wollte, so würde unsere Sache bald zerfallen. Auch dann, wenn ich nur der Lenker und Leiter der Arbeiten sein sollte, würde unsere Sache nicht vorwärts kommen; denn ich, als eine einzige Person, bin zu schwach dazu.

Wir bedürfen daher irgend einer Verbindung oder Akademie, welche von den Freunden unserer Sache selbst ins Leben gerufen, für alle Autorität ist. Ich beabsichtige nun, die Schaffung einer solchen Verbindung unseren Freunden vorzuschlagen.

Die Leser werden sich vielleicht noch erinnern, dass ich in der „Aldono al la Dua libro“ den Rat erteilte, die Freunde unserer Sache sollten im Falle der Nichtverwirklichung des amerikanischen Kongresses selbst einen solchen berufen oder auch eine Akademie gründen, aber damit zu warten, bis zum Jahre 1893.

Bis zu dieser Zeit, d. i. während der ersten 5 Jahre, sollte nach meiner Meinung an der Sprache nichts geändert werden und die Aufgabe aller Freunde darin bestehen, für die Stärkung und Verbreitung derselben Sorge zu tragen. Aber viele unserer Freunde wollen nicht geduldig abwarten und arbeiten, sondern bestehen darauf, dass die eine oder die andere Änderung schon jetzt vorgenommen werde. Sie vergessen aber, dass die Geduld die einzige Bedingung ist, ohne welche unsere Sache in grosse Gefahr geraten kann. Ich wiederhole, dass meine persönliche Meinung jetzt noch dieselbe ist, wie zuvor, nämlich die, dass wir in den ersten Jahren nicht an Verbesserung unserer Sprache denken dürfen,

## Tutmonda ligo de Esperantistoj.

La legantoj memoras, ke ne volante preni sur min la tutan respondecon por la sorto de nia lingvo, mi fordonis ĝin en la manojn de la kongreso, kiu estis esperata laŭ la iniciativo de la Amerika Filozofia Societo. Sed nun pasis jam pli ol 1½ jaroj, kaj la kongreso bedaŭrinde ne efektiviĝis, kaj pro la indiferenteco de la instruituloj ĝi jam kredeble neniam efektiviĝos. Dume la afero restis sen kondukanto. Kvankam de multaj flankoj oni sin turnas ankoraŭ ordinaro al mi mem kun diversaj proponoj, sed mi ne havas jam la privilegion nek akcepti nek malakcepti la faratajn proponojn kaj fari en la lingvo ian ŝanĝon laŭ mia propra bontrovo. Se mi volus ankoraŭ esti mem leĝdonanto en la lingvo kaj ŝanĝadi ĝin ĉiutage laŭ mia propra volo, tiam la afero baldaŭ tute detruigus. Ankaŭ se mi volus esti mem la kondukanto de la laboroj, la afero ne malproksime irus, ĉar mi, unu sola persono, estas tro malforta. Ni bezonas nun havi ian ligan aŭ akademion, kiu estante kreita de la amikoj mem, estus aŭtoritata por ĉiuj amikoj de mia afero. La kreadon de tia ligo mi intencas nun proponi al niaj amikoj.

El la „Aldono al la Dua Libro“ la legantoj eble memoras ankoraŭ, ke mi konsilis, ke en la okazo se la kongreso Amerika ne efektiviĝos, la amikoj de nia afero faru mem kongreson aŭ fondu akademion ne pli frue ol en la jaro 1893. Ĝis tiu tempo, t. e. en la daŭro de la unuaj 5 jaroj, en la lingvo laŭ mia opinio nenio devus esti ŝanĝata kaj la tuta laborado de la amikoj devus havi la celon nur fortigi kaj vastigi nian aferon. Sed multaj el niaj amikoj ne volas paciencie atendi kaj labori; ili volas, ke tia aŭ alia ŝanĝo estu farata jam nun. Ili forgesas, ke pacienco estas la unua kondiĉo, sen kiu nia sankta afero povas baldaŭ fali en grandan danĝeron. Mi ripetas, ke mia persona opinio restas ankoraŭ nun tiu sama kiel antaŭe, t. e. ke la kelkaj unuaj jaroj ni ne devas pensi pri plibonigado de la lingvo (kvankam la plej granda de la farataj proponoj tute ne plibonigus la lingvon); sed nur pri

sondern an deren Stärkung und Verbreitung. Da ich aber die ganze Verantwortlichkeit betreffs unserer wichtigen Sache nicht allein auf mich nehmen und nicht haben möchte, dass man, in meiner Weise zu arbeiten, die Härtnäckigkeit des Autors erblicke oder auch die Furcht, das Geld zu verlieren, welches ich bis jetzt unserer heiligen Sache geopfert habe, so will ich nun selbst den Vorschlag machen, dass unsere Freunde schon jetzt eine internationale Verbindung gründen, und in der Hand dieses Bundes wird von jetzt an das Schicksal unserer Sache liegen. Diese Verbindung sei der einzige und absolute Gesetzgeber betreffs unserer Sprache. Dieselbe wird von unseren Freunden selbst ins Leben gerufen werden und ihre Beschlüsse werden die Beschlüsse der Majorität unserer Freunde darstellen. Ich verspreche, mich diesen Entscheidungen zu unterwerfen, und hoffe, dass dieselben auch allen unseren Freunden heilig sein werden und dass keiner von ihnen gegen dieselben arbeiten wird, wenn sie ihm auch nicht gefallen sollten.

In einer der folgenden Nummern des „Esperantisto“ werde ich die von mir für diese internationale Verbindung der Esperantisten projektierten Statuten veröffentlichen. Aber bevor ich meinen Entwurf dem Drucke übergebe, möchte ich bitten, dass auch andere Freunde ihre Vorschläge der Redaktion einsenden. Einige der besten Entwürfe werden dann im „Esperantisto“ zum Abdruck gelangen, und dasjenige Projekt, welches unseren Freunden am meisten gefällt, wird hierauf angenommen werden.

Die wichtigsten Fragen, welche in den Entwürfen behandelt werden müssen, sind:

1. Was wird gefordert, um Mitglied der Verbindung zu werden?
2. Woher nimmt der Verein die zur erfolgreichen Arbeit nötigen Geldmittel?
3. Wie müssen die Lokalvereine organisiert werden, und in welcher Beziehung müssen dieselben zur Verbindung stehen?
4. Von welchen Personen und auf welche Weise wird die Verbindung verwaltet?
5. Von welchen Personen und auf welche Weise sind die Beschlüsse hinsichtlich der Sprach-Änderungen zu fassen?

Die einzusendenden Entwürfe dürfen selbstverständlich nicht nackte Antworten auf die angeführten Fragen sein; dieselben müssen vielmehr klar die ganze Organisation und Arbeit des Bundes behandeln. Wir bitten, dieselben sobald als möglich einzuschicken. Sehr dankbar würde ich auch unseren Freunden sein, wenn sie uns die betreffenden Entwürfe in zwei Exemplaren — eines an die Redaktion des „Esperantisto“ und das andere an mich — zuzusenden die Güte hätten.

L. Samenhof.

### Letero al la amikoj\*).

Multaj el niaj amikoj kredeble forte miras aŭ eble eĉ koleras min, ke en la lasta tempo mi estas tiel neakurata en la korespondado, en la elsendado de libroj k. c. Multaj leteroj adresitaj al mi restis ankoraŭ sen respondo, kaj ankaŭ la eldonado de la promesitaj verkoj iras tre malrapide. Mi petas, ke la amikoj bonkore min pardonu, ĉar ĝi venas ne el mia kulpo. Mi forlasis Varsovion kaj mi loĝas nun en alia urbo, sed la loko de mia konstanta loĝado ne estas ankoraŭ pozitive decidita. Ĝis mi min tute ordigos en mia nova loko, pasos ankoraŭ kredeble 2—3 monatoj. En tiu ĉi tempo, malgraŭ mia plej bona volo, mi ne povas esti tute akurata. Mi esperas tial, ke miaj amikoj pardonos al mi mian senvolan neakuratecon kaj malrapidecon. Ankaŭ en nia

\*) La daŭrigo de la artikolo „Esperanto kaj Volapük“ estos donita en la venonta numero.

ĝia fortigado kaj vastigado. Sed ne volante sur min solan preni la tutan respondecon por nia grava afero, ne volante ke oni vidu en mia maniero de laborado aŭtoran obstinecon aŭ la timon perdi la multan monon kiun mi enmetis en nian sanktan aferon, — mi proponas nun mem, ke niaj amikoj jam nun fondu tutmondan ligo, kaj en la manoj de tiu ĉi ligo kuŝos nun la tuta sorto de nia afero. Tiu ĉi ligo estu la sola kaj absoluta leĝdonanto en nia afero. La ligo estos kreita de niaj amikoj mem, kaj la decidoj de la ligo prezentos la decidojn de la plejmulto de la amikoj de nia afero. Mi promesas al tiuj ĉi decidoj mian tutan obeon, kaj mi esperas, ke ankaŭ por ĉiuj niaj amikoj la decidoj de la ligo estos sanktaj, kaj neniu, al kiu nia ideo estas kara, volos labori kontraŭ la decidoj de la ligo, se ili eĉ ne plaĉos al li.

En unu el la venontaj numeroj de la „Esperantisto“ mi donos mian projekton de statutoj por la tutmonda ligo de Esperantistoj. Sed antaŭ ol mi presos mian projekton mi petas ke ankaŭ la aliaj amikoj sendu al la redakcio iliajn projektojn. Kelkaj el la plej bonaj projektoj estos presitaj en la „Esperantisto“, kaj la projekto, kiu la plej multe plaĉos al niaj amikoj, estos akceptita.

La plej gravaj demandoj, kiuj devas esti preparolitaj en la projektoj, estas:

1. Kio estas postulata por fariĝo membro de la ligo?
2. Kie la ligo prenados la rimedojn materialajn por sukcesa laborado?
3. Kiel devas esti organizataj la kluboj lokaj kaj en kia rilato ili devas stari al la ligo?
4. De kiuj personoj kaj per kia maniero la ligo devas esti administrata?
- 5) De kiuj personoj kaj per kia maniero devas esti farataj la decidoj tuŝantaj la ŝanĝojn en la lingvo?

La sendotaj projektoj kompreneble ne devas esti sole nudaj respondoj je la donitaj demandoj, sed ili devas klare preparoli la tutan organizacion de la ligo kaj ĝian laboradon. Ni petas sendi la projektojn eble pli frue. Mi estos tre danka al la amikoj, se ili sendos la projektojn en du ekzempleroj: unu al la redakcio de la „Esperantisto“ kaj unu al mi mem.

L. Zamenhof.

gazeto mi ne povas en tiu ĉi tempo tiel multe labori, kiel mi volus. En la venonta numero de la „Esperantisto“ mi donos al miaj amikoj mian novan adreson; ĝis tiu tempo (kaj eĉ poste) oni povas ĉiam skribadi al mi laŭ mia adreso malnova. Mi esperas, ke mia neakurateco plej baldaŭ finiĝos.

Koran saluton al la proksimaj kaj malproksimaj  
de  
L. Zamenhof.

### Demando ankoraŭ ne preparolita\*).

En la unuaj provoj de lingvo tutmonda sur la unua plano estis la simpleco de la gramatiko, dum en la nunaj projektoj plej multe estas disputata la leksikologia demando.

\*) Ni donas tiun ĉi artikolon senŝanĝe, kvankam ne kun ĉio en ĝi ni konsentas. La redakcio.

Oni povas diferencigi tri specojn de lingvoj. 1) Lingvoj kun vortoj elpensitaj, ekzemple Volapük, Spelin k. c. 2) lingvoj kies vortoj ĉiuj estas prenitaj el diversaj lingvoj vivantaj sen ia ŝanĝo, kiel ili pretendas, ekzemple Kosmos, Anglo-Franca, Veltpik, kaj 3) lingvoj kiuj prenis la vortojn el vivantaj lingvoj kun ia ŝanĝo, kiel Pasilingua, „Lingvo internacia“ kaj aliaj. Nun estas la demando, kiu el tiuj principoj estas la plej vera. La unua el ili en la nuna tempo jam preskaŭ ne estas pli preparolata, ĉar nur tre malmultaj obstinaj ĝiaj amikoj penas ankoraŭ defendi tian specon de konstruo. La du lastaj sistemoj solaj povas nune havi ian pretendon je analizado, kaj tial faras al si konkurencon. Je l' unua rigardo povas ŝajni ke la sistemo, kiu prenas la vortojn kiel ili estas, havas pli multe ĉancojn (chance) gajni en tiu ĉi batalo. Sed se ni tiun ĉi demandon rigardos pli serioze, ni vidos, ke ĝi ne estas tiel.

Antaŭ ĉio ni rigardu, ĉu tia lingvo entute estas ebla! Lentze diras, ke en la Veltpik li prenas la vortojn tute kiel ili estas en la lingvoj vivantaj kaj nenion elpensas. Ni vidu ĉu ĝi estas tiel. Mi petas la legantojn, ne sciantaj la Veltpik, diri, kion signifas la vortoj „te, ra, il, tu, vu, om“. Ĉu Vi divenos, ke ili signifas „is, os, la, al, vi, homo“? Li tamen pretendas, ke li prenis la vorton „te“ el la germana finiĝo „te“ por imperfekto, kiun li tamen uzas kiel apartan vorton, kio en la germana lingvo neniam fariĝas; „ra“ el la franca finiĝo „ra“ en „sera, parlera“ k. c. La vorton „il“ li prenis el la itala lingvo, „vu“ li prenis el la franca „vous“ kaj „om“ el „homme“ (?). Vi vidas, ke ili tute ne estas prenitaj sen ŝanĝo. Kiu vorto estas pli simila al la lingvoj ekzistantaj, nia „homo“ aŭ lia „om“: homo (latine), hombre (hispane), homme (france), kaj cet. — Mi povas eĉ diri, ke tute sen ŝanĝo oni ne povas preni la vortojn, se oni volas ilin preni el malsamaj lingvoj, ĉar ilia ortografio estas tiel malegala, ke oni ne povas kunigi ĝin sub unu regulo. Lentze nun tute ne rigardas la ortografion sed nur la sonon, tial lia skribado ofte ne havas eĉ unu literon el tiuj, je kiuj tiu vorto estas skribata en la propra lingvo. Ĝi estas demando, ĉu tia lingvo estas pli simpla ol alia, en kiu malmulte nuance estas ŝanĝataj la sono kaj la ortografio, kiu tamen konservas tian similecon kun la radika vorto, ke ili estas tuj rekoneblaj al la civilizita homo; ekzemple se mi skribas „sonĝo“, tiu vorto havas pli da simileco, ol se Lentze skribus tute fonetike laŭ sia ortografio „sonj“; ni skribas „ĉokolado, ĉemizo, cigaro, balanci“ kaj li: „shokolad, ŝemis, tsigar, balants“. Mi demandas, kiuj estas pli similaj al la vereco? Ĝi estas vera, niaj vortoj ne pretendas esti tute samaj, kiel en la originalaj lingvoj, sed ili estas pli naturaj kaj similaj al la ekzistantaj vortoj, ol liaj, kiuj havas tamen tiun pretendon. Ni vidas, ke preni sen ŝanĝo vortojn el malsamaj lingvoj estas necbla, sed ni supozu, ke ĝi estas ebla, kaj vidu, kio tiam elvenos.

Kian ajn lingvon ni regardu, ĉiam ĝi havas sian propran karakteron, sian enpreson, kiu diferencigas ĝin de ĉiuj aliaj lingvoj eĉ parencaj je ĝi. Se oni demandas, kio do propre estas tio, kio malsamigas ilin, ni vidos, ke ĝi estas la unuforma speco de ŝanĝo de la vortoj, prenitaj el la originala, naskiga lingvo. Se ni nun rigardos ĉiujn plej gravajn eŭropajn lingvojn, ni povos trovi en ili multajn samajn regulojn en la formado de siaj vortoj. Mi provos montri al la leganto kelkajn el tiuj reguloj filologiaj, kiujn mi povis trovi, al kiuj subiras preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj. Du el tiaj reguloj estas, ke en la vortoj nature formitaj de la tempo kaj ne surligitaj al la lingvo per artefara maniero de instruituloj, la akcento restas sur la silabo de la aborigena lingvo kaj ke la mallongaj vokaloj ofte estas forglutataj kaj tiel la vortoj kuntiriĝas kaj fariĝas malpli longaj, kaj entute la vortoj estas

plimoligataj. Ekzemple la franca vorto fariĝinta el la latina „frágilis“ per ŝanĝoj „frágile, fragile, frajle, frêlo“ alvenis al tiu ĉi lasta formo, dum la vorto „fragile“, kiu estas renkontata en la franca lingvo, estas enportita de instruituloj, kiuj kun plezuro uzis latinajn formojn, kaj kiu de la popolo ne scianta ĝian devenon estis akcentita laŭ franca kutimo je la lasta silabo. Tiel same la vorto „meuble“ estas natura vorto, dum „mobile“ enportita de instruituloj. Oni rimarkos tamen, ke en malsamaj lingvoj ekzistas vortoj, devenantaj de unu sama fonto, kiuj havas la akcenton je nesamaj silaboj kaj tamen fariĝis tute nature. Sed en tiu okazo oni rimarku, ke unuj formiĝis de l'radiko, aliaj de l'nominativo, aliaj de l'verbo k. c.; ekzemple oni povas fari jenan ĉenon de vortoj: „löve (germane), lev (ruse), leu (germane), leo (latine), leon (hispane), leone (itale), lion (france). Komence oni povas pensi ke la germana „löve“ (Löwe) kaj la franca „lion“ havas nenian rilaton inter si, ĉar ja nur unu litero estas sama en ili, tamen transirante trans la latina „leo, leonis“ oni tuj ekvidas la samecon. Tiel same la angla „nation“ (elparolu nĉsen) havas l'akcenton je l'unua silabo, dum la franca vorto „nation“ (elparolu nasióii) havas ĝin je la lasta; tamen la angla vorto formiĝis de la nominativo de la latina vorto „nátio“ dum la franca de la radiko „natió“. Tiuj du reguloj, kiujn mi montris, estas la principaj en preskaŭ ĉiuj lingvoj; ne sole la romanaj lingvoj obeas ilin, sed ankaŭ la germanaj kaj slavaj. Germane ekzemple ni trovas la du formojn „Oheim“ kaj „Óhm“, por la sama senco; en ĝi ni vidas, ke la neakcentita ei estas forglutita, kaj la akcento restis tie, kie ĝi estis. El la germana „Ségel“ per ŝanĝoj „segl, sejl, sail“ fariĝis la angla vorto „sail“; el germana „Hagel“ — angla „hail“, k. c., kaj neniam kaj nenie ni vidas tiajn formojn kiel „hagelo“ aŭ „butéro“. La germana „Butter“ kaj la franca „beurre“ estas en la sama parenco kiel „Hagel“ kaj „hail“, tute nature formitaj. Unu strangeco ankoraŭ devas esti preparolata, kiel el la „linia“ elvenis franca „ligne“. De kie tien ĉi venis la „g“? La afero tamen estas tute simpla, se ni laŭ la reguloj filologiaj transformigos la vorton: linia, linie, linj(e), kaj tiun ĉi laŭ analogia skribado de aliaj vortoj, kie „gn“ estas elparolata „nj“, oni malrekte skribis tiel, kaj la skribado ĝis nun restis. — Nun ni revenu al nia antaŭa demando, kio elvenos, se ni prenos la vortojn el ĉiuj plej gravaj lingvoj sen ŝanĝoj, kaj sen reguloj, kie oni ilin devas preni. Tiam tia lingvo, farita el amaso da kunĵetitaj vortoj sen rilato inter si, tute similos je trupo da rabistoj, retenataj inter si per neniaj leĝoj; kaj tia konglomerato de malegalaj elementoj necese ruiniĝos, rompiĝos kaj disfalos en eroj, ĉar nenio en la mondo povas esti konservata alie ol per firmaj leĝoj kaj reguloj. — Tial la ideala lingvo internacia devas ne esti konglomerato de vortoj el diversaj lingvoj, sed lingvo havanta sian propran karakteron, sian propran vizaĝon, por tiel diri, per kiu ĝi diferencus de la parencaj lingvoj. Ĝi devas havi proprajn regulojn kiel ŝanĝi la vortojn, prenitajn el aliaj lingvoj, por ilin almezuri al sia kadro. Tamen oni devas sin gardi tion fari tiel, kiel en la Volapük, kie tute senfilologie la elpensinto forĵetadis jen la komencon, jen la finon de l'vorto, kaj ŝanĝadis ĉiujn literojn en aliaj se ĝi plaĉis al li. La vortoj povas esti ŝanĝataj nur laŭ reguloj, komunaj al la eŭropaj lingvoj kaj nur en limo de nuanco. Tial la vortoj de Esperanto kiel „najbaro, aĝo, ĉagreni, gajni k. c.“ estas bonaj kaj tute filologiaj; tamen vortoj kiel „butéro, linio, nacio, animo, titolo, boato“ kaj ceteraj havantaj nenaturan akcenton, aŭ ankoraŭ vortoj tre similaj je volapükaj „mag, nat, fem“, kiel ekzemple niaj „vosto“ (el rusa „ĥvost“) „penti“ (el franca repentir“) „imagi“ (el franca „imaginer“), „nepre“ (el rusa „nepremenno“), „sago“ (el latina „sagitta“) [kaj kiel oni tiam nomos la planton „sago“], „taĉmento“ (el franca „détachement“)

estas tute necblaj. Laŭ mia penso tiaj vortoj devas esti tute forigataj el la lingvo, aŭ ŝanĝataj tiel, ke la plej gravaj filologiaj leĝoj estus plenumataj.

Restas nun starigi kelkajn regulojn, el kiuj lingvoj oni devas preni la diversajn vortojn, kaj mi proponus jenajn:

1) La vortoj jam internaciaj estu prenataj el la lingvo, el kiu ili estas prenitaj en la nunaj lingvoj, kaj tiam de la radiko de tiu ĉi vorto.

2) Vortoj tuŝantaj la historion naturan, kiel botanikaj, zoologiaj k. c. — el la lingvo latina, kiel konataj en tiu ĉi formo al la instruituloj de la tuta mondo.

3) Vortoj kaj esprimoj por maraj terminoj teknikaj — el la lingvoj angla kaj germana, kiel la plej mallongaj, plej signifantaj kaj plej multe uzataj.

Kaj cetere . . . . .

4) La aliaj vortoj de la ordinara vivo, malsamantaj en la lingvoj, devas esti prenataj el la plej gravaj eŭropaj lingvoj en tia formo, kiu estas aŭ plej ofte renkontata, aŭ plej bonsona, mallonga, facila kaj subiranta plej bone al la filologiaj reguloj, kiujn oni iom post iom starigos por la lingvo internacia.

Mi esperas, ke tiu ĉi artikoleto, rigardinta la demandon de lingvo internacia de flanko ankoraŭ ne priparolita, kiom mi scias, alpuŝos la amikojn de la afero al novaj trovoj kaj tiel helpos al feliĉa finiĝo de tiu ĉi ĉiuhoma laboro, je kiu ni laboru kaj esperu.

E. de Wahl.

## Die kleine Seejungfer.

Märchen von Andersen.

Übersetzt von Anna R.

Weit draussen im Meere ist das Wasser so blau wie die schönsten Blätter der Kornblume und so klar wie das reinste Glas; aber es ist sehr tief, tiefer, als irgend ein Ankertau reicht; viele Türme müsste man auf einander stellen, um vom Grunde des Meeres aus dessen Oberfläche zu erreichen. Dort haust das Volk des Meeres.

Aber man denke nicht, dass da der nackte, weisse, sandige Boden sei; nein, hier wachsen die wunderbarsten Bäume und Gewächse, deren Stiele und Blätter so biegsam und elastisch sind, dass sie sogar bei der geringsten Strömung des Wassers sich wie lebende Wesen bewegen. Alle Fische, kleine und grosse, gleiten durch ihre Zweige gradeso, wie hier oben die Vögel in der Luft. An der tiefsten Stelle steht der Palast des Meerkönigs. Die Mauern bestehen aus Korallen und die hohen Fenster aus klarstem Bernstein; das Dach ist aus Muscheln verfertigt, welche sich je nach der Strömung des Wassers schliessen oder öffnen. Dies gewährt einen sehr schönen Anblick, weil in jeder Muschel strahlende Perlen liegen, von welchen jede einzelne schon eine wahre Zierde in der Krone einer Königin wäre. Der Meerkönig hatte schon vor langer Zeit seine Gemahlin verloren; an deren Stelle besorgte seine alte Mutter das Hauswesen. Sie war ein kluges Weib, dabei aber sehr stolz auf ihren hohen Adel; deshalb trug sie zwölf Austern auf dem Schwanze, während andere Adlige nicht mehr als sieben solche tragen sollten. Im übrigen verdiente sie alles Lob, besonders deshalb, weil sie die grösste Sorgfalt und Liebe für die kleinen Prinzessinnen, ihre Enkelinnen, bekundete. Diesse waren sechs sehr schöne Kinder, das jüngste aber war das schönste unter allen; sein Haupt war durchsichtig und zart wie Rosenblättchen, seine blauen Augen glänzten wie das tiefste Meer, aber gleich seinen übrigen Geschwistern entbehrte es der Füsse — der Körper endigte in einen Fischschwanz. Den ganzen Tag über spielten die Prinzessinnen in den grossen Sälen des Palastes, deren Wände so beschaffen waren, dass man meinte, es seien lebende Blumen aus denselben herausgewachsen. Waren die grossen Fenster geöffnet, dann schwammen die Fische zu ihnen hinein gradeso, wie die Schwalben in unsere Wohnräume fliegen, wenn die Fenster nicht geschlossen sind. Sie schwammen zu den kleinen Prinzessinnen hin, frassen aus ihren Händen und liessen sich liebkosen.

Vor dem Schlosse war ein grosser Garten mit roten und dunkelblauen Blumen; die Früchte strahlten wie Gold und die Blumen wie Feuer, während die Stiele und Blätter sich unaufhörlich bewegten. Die Erde selbst war der feinste Sand, aber so blau wie die Schwefelflamme. Über dem Ganzen lag ein eigentümlich blauer Schein. Man hätte eher glauben mögen, dass man hoch in der Luft stehe und nur Himmel

## La virineto de l' maro.

Fabelo de Andersen.

Tradukis Anna R.

Malproksime en la maro la akvo estas tiel blua, kiel la folioj de la plej bela cejano, kaj klara kiel la plej pura vitro, sed ĝi estas tre profunda, pli profunda ol povas atingi la ankro; multaj turoj devus esti starigitaj unu sur la alia, por atingi de la fundo ĝis super la akvo. Tie loĝas la popolo de l' maro.

Sed ne pensu, ke tie estas nuda, blanka, sabla fundo; ne, tie kreskas la plej mirindaj arboj kaj kreskaĵoj, de kiuj la trunketo kaj folioj estas tiel flekseblaj kaj elastaj, ke ili ĉe la plej malgranda fluo de l'akvo sin movas kiel vivaj estaĵoj. Ĉiuj fiŝoj, malgrandaj kaj grandaj, traglitaj inter la branĉoj, tute tiel kiel tie ĉi supre la birdoj en la aero. En la plej profunda loko staras la palaco de la reĝo de l' maro. La muroj estas el koraloj, kaj la altaj fenestroj el la plej travidebla sukceso; la tegmento estas farita el konkoj, kiuj sin fermas kaj malfermas laŭ la fluo de l'akvo. Tio ĉi estas belega vido, ĉar en ĉiu konko kuŝas brilantaj perloj, el kiuj ĉiu sola jam estus efektiva beligaĵo en la krono de reĝino.

La reĝo de l' maro perdis jam de longe sian edzinon, sed lia maljuna patrino kondukis la mastron de l' domo. Ŝi estis saĝa virino, sed tre fiera je sia nobeleco, tial ŝi portis dekdu ostrojn sur la vosto, dum aliaj nobeloj ne devis porti pli ol ses. Cetere ŝi meritis ĉian laŭdon, la plej multe ĉar ŝi montris la plej grandan zorgecon kaj amon por la malgrandaj reĝidinoj, ŝiaj nepinoj. Ili estis ses belegaj infanoj, sed la plej juna estis tamen la plej bela el ĉiuj; ŝia haŭto estis travidebla kaj delikata kiel folieto de rozo, ŝiaj okuloj bluj kiel la plej profunda maro; sed, kiel ĉiuj aliaj, ŝi ne havis piedojn, la korpo finiĝis per fiŝa vosto.

La tutan tagon ili povis ludi en la palaco, en la grandaj salonoj, kiel vivaj floroj elkreskadis el la muroj. La grandaj sukcesaj fenestroj estis malfermataj, kaj tiam la fiŝoj enaĝadis al ili, tute kiel ĉe ni enflugas la hirundoj, kiam ni malfermas la fenestrojn. La fiŝoj alnaĝadis al la malgrandaj reĝidinoj, manĝadis el iliaj manoj kaj lasadis sin karesi.

Antaŭ la palaco sin trovis granda ĝardeno kun ruĝaj kaj nigrablujaj floroj; la fruktoj brilis kiel oro kaj la floroj kiel fajro, dum la trunketoj kaj folioj sin movis senĉese. La

über und unter sich habe, als dass man auf dem Grunde des Meeres sei. Bei Windstille konnte man die Sonne erblicken; sie erschien wie eine Purpurblume, aus deren Kelche alles Licht strömte.

Jede der kleinen Prinzessinnen hatte im Garten ein eigenes Plätzchen, wo sie nach Belieben und Gutdünken graben und pflanzen durfte. Die eine gab ihrem Blumenbeete die Gestalt eines Walfisches, einer anderen gefiel es besser, dass das ihrige einem kleinen Meerweibe gleiche, aber die jüngste machte ihre Beete rund gleich der Sonne und hatte Blumen, die rot wie diese glänzten. Sie war ein sonderbares Kind, still und nachdenkend, und wenn die anderen Schwestern mit den merkwürdigsten Sachen, welche sie von gestrandeten Schiffen erhalten hatten, sich schmückten, wollte sie ausser den rosenroten Blumen, welche der Sonne glichen, nur eine hübsche Statue haben, welche einen herrlichen Knaben vorstellte, der aus weissem, klarem Marmor gehauen und bei einem Schiffsbruch auf den Meeresgrund gekommen war. Sie pflanzte bei der Statue eine rosenrote Trauerweide, welche herrlich wuchs und ihre Zweige ausbreitete über dieselbe gegen den blauen Sandboden herunter, wo der Schatten sich violett zeigte und gleich den Zweigen in Bewegung war; es sah aus, als ob die Spitze und die Wurzeln mit einander spielten, wie wenn sie sich küssen wollten.

Nichts war ein grösseres Vergnügen für die jugendlichen Prinzessinnen, als von der oberen Welt und den Menschen etwas zu hören. Die alte Grossmutter musste alles, was sie von Schiffen und Städten, Menschen und Tieren wusste, erzählen; aber für das Schönste und Wunderbarste hielt sie das, dass oben auf der Erde die Blumen dufteten, was bei denjenigen auf dem Meeresgrunde nicht der Fall war, und dass die Wälder grün wären, und dass die Fische, die man dort zwischen den Bäumen erblickte, laut und herrlich singen könnten, so dass es eine Lust sei, ihnen zuzuhören. Es wären die kleinen Vögel, welche die Grossmutter Fische nannte; denn sonst konnten ihre Enkelinnen, welche noch keinen Vogel gesehen hatten, sie nicht verstehen.

„Wenn ihr euer fünfzehntes Lebensjahr erreicht habt,“ sagte die Grossmutter, „dann sollt ihr die Erlaubnis erhalten, aus dem Meeresfelsen euch zu erheben, im Mondschein auf der Klippe zu sitzen und die grossen Schiffe vorbeisegeln zu sehen; Wälder und Städte werdet ihr auch erblicken!“ Bald wurde eine der Schwestern fünfzehn Jahre alt, aber von den andern war die eine immer ein Jahr jünger als die andere, so dass die jüngste von ihnen noch volle fünf Jahre zu warten hatte, bevor sie von dem Grunde des Meeres hinaufkommen und erfahren konnte, wie es bei uns aussehe. Aber die eine versprach, der anderen zu erzählen, was sie gesehen und was ihr am ersten Tage am meisten gefallen habe; denn ihre Grossmutter sagte ihnen nicht genug; es gab noch sehr viele Dinge, worüber sie auch Auskunft haben wollten.

Keine war sehnsüchtiger, als die jüngste, gerade sie, die noch die längste Zeit zu warten hatte, und die stets still und gedankenvoll war. Manche Nacht stand sie am offenen Fenster und sah durch das dunkelblaue Wasser empor, wie die Fische mit ihren Flossen und Schwänzen plätscherten. Mond und Sterne konnte sie sehen; freilich schienen diese ganz bleich, aber durch das Wasser sahen sie grösser aus, als vor unseren Augen. Zog dann etwas, einer schwarzen Wolke gleich, unter ihnen hin, so wusste sie, dass es entweder ein Walfisch sei, der über ihr schwimme, oder ein Schiff mit vielen Menschen; diese dachten sicher nicht daran, dass eine schöne Meerjungfer unten stehe und ihre weissen Hände gegen das Schiff emporstrecke. Nun war die älteste Prinzessin fünfzehn Jahre alt und durfte über die Meeresfläche emporsteigen. Als sie zurückkam, hatte sie Vieles zu erzählen; aber das Schönste, sagte

tero estis la plej delikata sablo, sed blua kiel flamo de sulfuro. Super ĉio estis ia blua brileto. Oni povus pli diri, ke oni sin trovas alte supre, en la aero, havante nur ĉielon super kaj sub si, ol ke oni estas sur la fundo de l' maro. En trankvila vetero oni povis vidi la sunon, kiu elrigardis kiel purpura floro, el kiu venis lumo ĉirkaŭen.

Ĉiu el la malgrandaj reĝidinoj havis en la ĝardeno sian apartan loketon, kie ŝi povis laŭ sia plaĉo kaj bontrovo fosi kaj planti. Unu donis al sia florejo la formon de baleno; alia trovis pli bone, ke ŝia florejo similas je virineto de l' maro; sed la plej juna donis al la sia formon rondan kiel la suno kaj havis nur florojn ruĝe brilantajn kiel tiu. Ŝi estis en ĉio originala infano, silenta kaj pensanta, kaj kiam la aliaj fratinoj sin ornamis per la mirindaj objektoj, kiujn ili ricevis de ŝipoj venintaj al la fundo, ŝi volis havi, ekster la ruĝaj floroj kiuj similis je la suno, nur unu belan statuon, kiu prezentis tre belan knabon. Ĝi estis farita el blanka klara marmoro kaj falis sur la fundon de l' maro ĉe la rompiĝo de la ŝipo. Ŝi plantis apud la statuon rozaruĝan salikon, kiu kreskis bele kaj tenis siajn branĉojn super la statuon, ĝis la blua sablo de l' fundo, kie la ombro havis koloron nigrablauan kaj movadis sin senĉese kiel la branĉoj. Ĝi elrigardis kiel la supro kaj la radikoj ludus inter si kaj sin kiusus.

Ne estis pli granda plezuro por la juna reĝidino, ol aŭdi pri la mondo supra kaj la homoj. La maljuna avino devis rakontati ĉion, kion ŝi sciis pri ŝipoj kaj urboj, homoj kaj bestoj. Sed la plej bela kaj mirinda estis por ŝi, ke la floroj supre sur la tero odoras, kion ne faras la floroj sur la fundo de l' maro, kaj ke la arbaroj estas verdaj kaj la fiŝoj, kiujn oni vidas tie inter la branĉoj, tiel laŭte kaj agrable kantas, ke ĝi estas plezuro ilin aŭdi. Ĝi estis la birdetoj, kiujn la avino nomis fiŝoj, ĉar alie ŝiaj nepinoj, kiuj ne vidis ankoraŭ birdojn, ne povus ŝin kompreni.

„Kiam Vi atingos la aĝon de dekkvin jaroj“, diris la avino, „Vi ricevos la permeson sin levi el la maro, sidi sub la lumo de l' luno sur la maraj ŝtonegoj kaj rigardi la grandajn ŝipojn, kiuj veturos antaŭ Vi; Vi vidos ankaŭ arbarojn kaj urbojn!“ Baldaŭ unu el la fratinoj devis atingi la aĝon de dekkvin jaroj, sed la aliaj . . . ĉiu el ili estis unu jaron pli juna ol la alia, tiel ke al la plej juna mankis ankoraŭ plenaj kvin jaroj ĝis ŝi povus sin levi de la fundo de l' maro kaj vidi kiel nia mondo elrigardas. Sed unu promesis al la alia rakonti al ŝi, kion ŝi vidis kaj kio la plej multe plaĉis al ŝi en la unua tago; ĉar ilia avino ne sufiĉe ankoraŭ rakontis al ili, estis ankoraŭ multaj aferoj, pri kiuj ili volus scii.

Sed neniu el ili estis tiel plena je deziroj, kiel la plej juna, ĝuste ŝi, kiu devis ankoraŭ la plej longe atendi kaj estis tiel silenta kaj plena je pensoj. Ofte en la nokto ŝi staris antaŭ la malfermita fenestro kaj rigardis supren tra la mallume blua akvo, kiel la fiŝoj per siaj naĝiloj kaj vosto ĝin batis. La lunon kaj stelojn ŝi povis vidi; ili ŝajnis tre palaj, sed por tio ili tra la akvo elrigardis multe pli grandaj ol antaŭ niaj okuloj. Se sub ili glitis io kiel nigra nubo, ŝi sciis, ke tio ĉi estas aŭ baleno naĝanta super ŝi, aŭ eĉ ŝipo

sie, sei im Mondschein auf einer Sandbank in der ruhigen See zu liegen und die nahe gelegene Küste mit der grossen Stadt zu betrachten, wo die Lichter gleich hundert Sternen blinken, die Musik, das Lärmen von Wagen und Menschen zu hören; die vielen Kirchtürme zu sehen und das Läuten der Glocken zu vernehmen. Gerade die jüngste, welche noch am längsten harren musste, bis sie sich erheben durfte, wurde am meisten von der Sehnsucht gequält. Mit Spannung horchte sie auf diese Erzählung, und wenn sie abends am offenen Fenster stand und durch das dunkelblaue Wasser emporblickte, gedachte sie der grossen Stadt mit ihrem Lärm, und es dünkte ihr, sie vernähme den Klang der Gebetglocken, der nach unten zu ihr dränge.

Im folgenden Jahre erhielt die zweite Schwester die Erlaubnis, aus dem Wasser emporzusteigen und zu schwimmen, wohin sie wolle. Sie tauchte auf, als die Sonne unterging, da dieser Anblick nach ihrer Meinung der schönste sei. Der ganze Himmel habe wie Gold ausgesehen, und die Schönheit der Wolken könne sie gar nicht beschreiben. Rot und violett waren sie über ihr dahingesehelt, aber weit schneller als diese flog, einem langen, weissen Schleier gleich, ein Schwarm wilder Schwäne über das Wasser hin, wo die Sonne stand. Sie flogen ihr entgegen, aber diese sank, und der Rosenschein verlosch auf der Meeresfläche und in den Wolken.

Das Jahr darauf kam die dritte Schwester an die Reihe; sie war die mutigste von allen und schwamm deshalb über einen breiten Fluss, der in das Meer mündete. Schlösser, Dörfer und Hütten schimmerten aus prächtigen Wäldern hervor. Sie hörte, wie die Vögel sangen, und die Sonne schien so warm, dass sie oft unter das Wasser tauchen musste, um ihr brennendes Antlitz abzukühlen. In einer kleinen Bucht traf sie einen Schwarm kleiner Menschenkinder. Diese waren völlig nackt und plätscherten im Wasser. Sie wollte mit ihnen spielen, aber sie entflohen mit Schrecken. Als aber ein kleines, schwarzes Tier, ein Hund — ein solches Tier hatte sie noch nie gesehen — an das Ufer kam und sie schrecklich anbellte, da wurde sie ängstlich und suchte die offene See wieder zu erreichen.

Doch nie konnte sie die prächtigen Wälder, die grünen Hügel und die niedlichen Kinder vergessen, die im Wasser zu schwimmen vermochten, obgleich sie keine Flossen hatten wie die Fische.

Die vierte Schwester war nicht so dreist; sie blieb draussen im wilden Meere und erzählte, dass es gerade dort am schönsten sei. Man sehe ringsumher, und der Himmel stehe wie eine gläserne Kugel über dem Meere. Schiffe habe sie erblickt, aber nur aus weiter Ferne; diese hätten ausgesehen wie die Möven; spielende Delphine wälzten sich, und die grossen Walfische spritzten Wasser aus ihren Nasenlöchern hervor, als wenn es Hunderte von Springbrunnen wären.

Jetzt kam die Zeit für die fünfte Schwester; ihr Geburtstag war gerade mitten im Winter, und darum erblickte sie manches, was die anderen das erste Mal nicht gesehen hatten. Die See sah ganz grün aus, und ringsumher schwammen grosse Eisberge, von welchen nach ihrer Erzählung jeder erschien wie eine Perle, aber doch weit grösser als die Türme, welche die Menschen bauen. Sie zeigten sich in den wunderbarsten Gestalten und glänzten wie Diamanten. Sie hatte sich auf einen der grössten gesetzt, und alle Schiffer kreuzten erschrocken draussen herum, wo sie sass und den Wind mit ihren langen Haaren spielen liess; aber gegen Abend wurde der Himmel mit Wolken überzogen; es blitzte und donnerte, während die schwarze See die grossen Eisblöcke hoch emporhob und sie im roten Blitze erglänzen liess. Auf allen Schiffen senkte man die Anker; da war eine Angst und ein Grauen.

kun multaj homoj. Ili certe ne pensis, ke bela virineto de l' maro staras sur la fundo kaj eltiras siajn blankajn manojn kontraŭ la ŝipo.

Jen la plej maljuna reĝidino atingis la aĝon de dekkvin jaroj kaj ricevis la permeson sin levi super la supraĵon de l' maro. Kiam ŝi revenis, ŝi havis multege por rakonti; sed la plej bela estas, ŝi diris, kuŝi en la lumo de l' luno sur supermara sablaĵo sur trankvila maro kaj rigardi la grandan urbon, kiu sin trovas tuj sur la bordo de l' maro, belan urbon, kie la lumoj brilas kiel centoj da steloj, aŭdi la muzikon kaj la bruon de kaleŝoj kaj homoj, vidi la multajn preĝejojn kaj turojn kaj aŭskulti la sonadon de la preĝejaj sonoriloj. Ĝuste ĉar al la plej juna estis ankoraŭ longe malpermesita sin levi, ŝi la plej multe sentis grandan deziregon je ĉio ĉi. Kun kia atento ŝi aŭskultis tiujn ĉi rakontojn! Kaj kiam ŝi poste je l' vespero staris antaŭ la malfermita fenestro kaj rigardis tra la mallume-blua akvo, ĉiuj ŝiaj pensoj estis okupitaj je la granda urbo kun ĝia bruado, kaj ŝajnis al ŝi, ke la sonado de la preĝejaj sonoriloj trapenetas mal-supren al ŝi.

Post unu juro la dua fratino ricevis la permeson sin levi tra la akvo kaj naĝi kien ŝi volas. Ŝi suprennaĝis ĉe la subiro de la suno, kaj tiu ĉi vido laŭ ŝia opinio estis la plej bela. La tuta ĉielo elrigardis kiel oro, ŝi diris, kaj la nuboj — ha, ilian belecon ŝi ne povus sufiĉe bone priskribi! Ruĝaj kaj nigrablauaj ili sin transportis super ŝi, sed multe pli rapide ol ili, flugis, kiel longa blanka kovrilo, amaso da sovaĝaj cignoĵoj super la akvo al la foriganta suno. Ili flugis al la suno, sed tiu ĉi malleviĝis kaj la roza brilo estingiĝis sur la maro kaj la nuboj.

En la sekvanta jaro la tria fratino sin levis; ŝi estis la plej kuraĝa el ĉiuj kaj naĝis tial supren en unu larĝan riveron, kiu fluas al la maro. Palacoj kaj vilaĝaj dometoj estis vidataj tra belegaj arbaroj: Ŝi aŭdis kiel ĉiuj birdoj kantis, kaj la suno lumis tiel varme, ke ŝi ofte devis naĝi sub la akvon por iom malvarmigi sian brule varmegan vizagon. En unu malgranda golfo ŝi renkontis tutan amason da belaj homaj infanoj; ili kuradis tute nudaj kaj batadis en la akvo. Ŝi volis ludi kun ili, sed kun teruro ili forkuris. Poste venis malgranda nigra besto, tio estis hundo, sed ŝi antaŭe neniam vidis hundon; tiu ĉi komencis tiel furioze ŝin boji, ke ŝi tute ektimiĝis kaj ree forkuris en la malkovritan maron. Sed neniam ŝi forgesos la belegajn arbarojn, la verdajn montetojn kaj la maigrandajn infanojn kiuj povis naĝi kvankam ili ne havis fiŝan voston.

La kvara fratino ne estis tiel kuraĝa; ŝi restis en la mezo de la sovaĝa maro kaj rakontis, ke ĝuste tie estas la plej bele. Oni povas rigardi tre malproksime ĉirkaŭe, kaj la ĉielo staras kiel vitra kloŝo super la maro. Ŝipojn ŝi vidis, sed nur tre malproksime, ili elrigardis kiel mevoj; la ludantaj delfenoj sin renversadis kaj la grandaj bulenoj ŝprucis akvon el la truoj de siaj nazoj supren, ke ĝi elrigardis ĉirkaŭe kiel centoj da fontanoj.

Nun venis la tempo por la kvina fratino. Ŝia naskotago estis ĝuste en la mezo de vintro, kaj tial ŝi vidis, kion la aliaj la unuan fojon ne vidis. La maro estis preskaŭ tute verda, kaj ĉirkaŭe naĝis grandaj montoj de glacio, el kiuj, laŭ ŝia rakonto, ĉiu elrigardis kiel perlo kaj tamen estis multe pli granda ol la turoj kiujn la homoj konstruas. En la plej mirindaj formoj ili sin montris kaj brilis kiel diamantoj. Ŝi sidliĝis sur unu el la plej grandaj, kaj ĉiuj ŝipistoj forkuradis kun teruro de la loko, kie ŝi sidis kaj lasis la venton ludi kun ŝiaj longaj haroj. Sed je la vespero la ĉielo kovriĝis je nuboj, ĝi tondris kaj fulmis, dum la nigra maro levis la grandajn pecegojn de glacio alte supren kaj briligis ilin en la

Aber sie sass ruhig auf ihrem schwimmenden Eisberge und sah, wie die feurigen Blitze im Zickzack sich in das schäumende Meer schleuderten.

Jede von den Schwestern war das erste Mal entzückt über das Neue und Schöne, was sie über dem Wasser erblickte. Da sie nun als erwachsene Mädchen die Erlaubnis erhielten, hinaufzusteigen, wann sie wollten, wurde es ihnen gleichgiltig. Sie sehnten sich wieder zurück, und nach Verlauf eines Monats sagten sie, dass es bei ihnen unten doch am schönsten sei, und dass man sich dort doch am bequemsten fühle.

(Fortsetzung folgt.)

forta fulmado. Sur ĉiuj ŝipoj oni mallevis la velojn; estis timego, teruro, sed ŝi sidis trankvile sur sia naĝanta glacia monto kaj vidis, kiel la fajraj fulmoj zigzage sin jetadis en la ŝauman maron.

Kiam iu el la fratinoj venis la unuan fojon super la akvon, ĉiu estis ravata de la nova kaj bela, kiun ŝi vidis; sed nun, kiam ili kiel grandaĝaj knabinoj havis la permeson supreniri ĉiufoje laŭ sia volo, ĝi fariĝis por ili indiferenta; ili deziregis ree heimen, kaj post la paso de unu monato ili diris, ke malsupre en la domo estas la plej bele kaj tie oni sin sentas la plej oportune.

(Daŭrigo venos.)

## La pluva tago.

(El Longfellow.)

La tago malvarma, malgaja, sensuna;  
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;  
Vinujo je l' muro putranta sin tenas,  
Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas,  
Kaj la tago — malvarma, sensuna.

Ekhaltu, ho koro malgaja, ne plendu!  
Post nuboj la suno radias — atendu!  
Ne sola vi tiel kun sorto batalas,  
En vivon de ĉiu la pluvo ja falas,  
Kelkaj tagoj — malvarmaj sensunaj.

Mia vivo malvarma, malgaja, sensuna;  
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;  
Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj,  
Sed falas en vento espero kaj velkintaj,  
Kaj la tagoj — malvarmaj, sensunaj.

A. Grabowski.

## Che l' maro.

(El Heine.)

Ĉe l' maro nigra roko grandegas,  
Sur ĝi nun en sonĝoj mi sidas.  
La vento fajfas, la mevoj kriegas  
Kaj la ondoj bruantaj rapidas.

En mia memoro ne unu knabino,  
Ne unu koleg' en la mondo . . . .  
Kien ili foriĝis? Nur vento sen fino  
Eraras, kaj ŝaŭmas la ondo. E. de Wahl.

## Respondoj al la amikoj.

Al multaj demandantoj. Kelkaj ne antaŭviditaj cirkonstancoj malrapidigis la eldonadon de la „Kolekto“ kaj „Adresaro“. Nun la 1<sup>a</sup> kajero de la „Kolekto“ estas jam preta, kaj la 1<sup>a</sup> kajero de la „Adresaro“ estos preta espereble tre baldaŭ. Z-f.

Al s-ro J. R. kaj aliaj amikoj en Svedujo. De kelkaj flankoj viaj proponoj estas tre bonaj. En la alfabeto efektive estus utile fari ian ŝanĝon; sed restas la demando, kiel ĝin fari kaj kiu devas kaj povas ĝin fari? Multaj ŝanĝoj estas proponataj al la aŭtoro de ĉiu flanko, ĉiu proponas laŭ sia bontrovo; sed se la aŭtoro volus ĉiutage ŝanĝi la lingvon, tiam la tuta afero ja nenion taŭgos. La aŭtoro ne havas jam la privilegion fari ŝanĝojn laŭ sia opinio, kaj aŭtoritata kompetenta akademio ankoraŭ ne ekzistas. Nun kio restas fari? La respondo estas: 1) la ŝanĝojn, kiujn Vi proponas, skribu en formo de artikolo, montrante klare la vojon, per kiu la ŝanĝoj povas esti farataj, kaj tiun ĉi artikolon ni penos presi en la „Esperantisto“, por ke ĉiuj amikoj povu ĝin pripensi kaj preparoli, tiam estos teorie decidita ĉu Viaj proponoj estas bonaj; 2) helpu aŭ montru la vojon por baldaŭa fondiĝo de aŭtoritata akademio, — kaj tiam Viaj proponoj ankau praktike povas baldaŭ esti deciditaj. — Ne sufiĉe estas stari sur la flanko kaj montri malbonaĵon: ni devas labori ke la efektiva aŭ ŝajna malbonaĵo sen danĝero por la afero mem estu baldaŭ anstataŭita per plibonaĵo. Z-f.

Al s-ro R-g en P. Via rakonto el Gogol estas tradukita tute bone; sed bedaŭrinde ni ne povas ĝin uzi, ĉar ni havas jam grandan amason da tradukitaj rakontoj. Por la „Esperantisto“ ni petas Vin sendi sciigojn, novaĵojn,

korespondojn, ĉar por enprenadi rakontojn la gazeto estas tro malgranda. Se Vi povas eldoni Vian rakonton je Via propra kalkulo, kiel aparta libreto, Vi alportos grandan utilon al nia afero. Z-f.

Al s-ro la dentisto A. F-v en Saratov. Ankaŭ al Vi apartenas la antaŭirinta respondo. Z-f.

Al s-ro K. H. en Aleksandrovska. La elparolado de la duoblaj vokaloj aŭ, oŭ k. c. kiel Vi ĝin trovas en la gramatiko de la klubo Nürnberga, ne estas ia enkondukita novaĵo, sed ĝi estas simple ne bona klarigo de la regulo. [En la sono aŭ la a kaj la ŭ devas esti aŭdataj klare ĉiu aparte, sed ili faras unu silabon, ĉar efektive la litero ŭ ne estas vokalo. Tiel ekzemple la vorto „laudi“ devas esti elparolata laŭ-di.] Tiu sama ne bona esprimo de la regulo sin trovas bedaŭrinde ankaŭ en la gramatika parto de la No. 2 de la „Esperantisto“. La Red.

Al s-ro T. P. en Rosburgo. Se ni volus presadi la gazeton en tri lingvoj, ĝi estus por la plejmulto de la abonantoj perdita kosto. Eĉ la tradukon germanan ni donas ne pro oportuneco, sed pro kelkaj aliaj kaŭzoj, pri kiuj ni tie ĉi ne povas paroli. En unu tre granda lando oni ne enlasus nian gazeton sen traduko. Rigardu ankaŭ la respondon al s-ro J. R. en Svedujo.

Al s-ro R. en Biela. Fari ion por nia afero povas ĉiu, se li eĉ loĝas en la plej dezerta vilaĝo. Se Vi faros al Vi regulon dissendadi ĉiumonate aŭ ĉiusemajne certan nombron da vortaretoj (kun antaŭparolo) al diversaj personoj, tiam Vi alportos al nia afero multe pli grandan utilon, ol multaj el niaj amikoj, kiuj loĝas en grandaj urboj. Z-f.

Al s-ro G. en Varsovio. Ankaŭ al Vi mi varmege rekomendas la „vortareton kun la antaŭparolo“. Nia plej grava laboro devas esti ĉiam pligrandigadi la nombron de la personoj, kiuj ellernis nian lingvon; ĉia alia laboro estas flankata. Antaŭ ĉio ni devas penadi, ke nia afero stariĝu sur fortaj piedoj en la mondo; ĉio alia venos jam per si mem. Z-f.

Al s-ro J. L. en Bielaja Cerkov. Ĉu Vi jam komencis la presadon de Via lernolibro? Se Vi ne scias, kiam Vi devas uzi la formon „la“ kaj „l“, uzu ĉiam pli bone la formon „la“. La formon „l“ mi uzas ordinaro nur post prepozicioj, kiuj finiĝas per vokalo (ekzemple „de“, „tra“ k. c.); en ĉiaj aliaj okazoj mi uzas ordinaro la plenan formon „la“, ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, en la sono ne agrabila. Z-f.

Al s-ro R. en Moskovo. Sinjoro B. estante ankoraŭ en Varsovio havis ĉiam la kutimon paroladi „ni laboris“, „ni faris“ k. c. Sed efektive li absolute nenion ankoraŭ faris, li ne alportis ankoraŭ eĉ unu novan amikon al nia afero, kaj eĉ sian propran „promeson“ li ankoraŭ ne alsendis. Mi ripetas, ke ĉiu kiu ne faras al si en la fino de ĉiu monato la demando „kiom da novaj amikoj mi alportis al la afero“, tiu ne povas sin nomi amiko laboranto de nia afero, se li eĉ tute bone ellernis la lingvon. Z-f.

Al s-ro A. Grabowski. Mi estas tre dankema por Via konsilo kaj Via helpo. Plej koran saluton. La red.

Al s-ro J. R. en Malaga. Kun granda ĝojo mi legis Vian poŝtan karton. Via juĝo estas tre grava. Anstataŭ mono Vi povas sendi al mi signojn de poŝto de Via lando.

Al s-ro H. C. en Malaga. Ĉu Vi ricevis la gazetojn kaj la deziratan gramatikon? Vi povas skribi tre bone la lingvon germanan. Koran saluton.

Al s-ro M. S. Bogdanov en Sofia. Mi kaj miaj klubanoj tre ĝojgis je la sciigo, ke en Via urbo estas fondita klubo de Esperantistoj. Ni deziras al Vi plej bonan sukceson. Ankaŭ mi petas Vin alsendi plej bonece al nia klubo Vian gramatikon. Kun plej alta estimo.

Al s-ro Henriclundquist en Svedujo. Havu la bonecon kaj sendu al mi la adresojn de la amikoj de nia afero. Mi estos tre dankema por tiu ĉi servado. Kun plej alta estimo.

Al s-ro J. H. Šn. en Ober Dblg. Mi atendas senpacience je Via respondo. Kun plej kora saluto.

Al s-ro J. H. Tr. en Šalke. Skribu al mi, ĉu s-ro R. Scipio deziras, ke mi sendu al li multajn numerojn de nia gazeto, ĉar ĝi estas tre grava helpo en la propagado al nia afero. Kun plej kora saluto.

Al s-ro V. Riĵkov en V. Mi estas tre dankema por ĉia helpo de nia afero. Kun plej alta estimo.

Al s-ro Kerkhoven en Holland. Turnu Vin pro Via demando al sinjoro d-ro Zamenhof en Herson (Cherson). Plej koran saluton.

Al s-ro V. L. L. Konstant. Mi petas Vin sciigi Viajn dezirojn al sinjoro d-ro Zamenhof en Herson (Cherson). Kun plej bona saluto.

Al s-ro d-ro K. B. en Aulie-Ata. Tiajn amikojn, kiel

Vi nia afero ĝajnos espereble baldaŭ ankoraŭ tre multajn. Plej alta estimo.

Al s-ro H. en F. Vi povas ricevi la plej bonajn mielpanojn (pain d' épices) per la firmo Kleinlein, Königsstrasse 53.

La redakcio.

### Novajoj.

En Sofia, la ĉefurbo de Bulgarujo, estas fondita klubo de Esperantistoj. En la klubon estas akceptataj egale viroj kaj virinoj. La prezidanto estas sinjoro M. S. Bogdanov. La unua sciigo pri tiu ĉi klubo estas donita en la No. 19 de la Bulgara gazeto „Struma“ (de la 2. Oktobro 1889).

Sinjoro D-ro Daniele Marignoni el Crema (Crema) komencis la presadon de gramatiko de la lingvo Esperanto por Italoj.

Sinjoro Henriclundquist skribas, ke en la lasta tempo la lingvo Esperanto komencis ricevadi multajn amikojn en Svedujo.

En Francujo la gazeto komencis iom pli paroladi pri nia lingvo. Sinjoro A. Demonget sendis al ni en la lasta semajno ankoraŭ tri gazetojn kun grandaj artikoloj (Courrier de Paris, La petite Presse, Le XIX. Siècle).

Sinjoro M. S. Bogdanov el Sofia preparas por la presado gramatikon de la lingvo Esperanto por Bulgaroj.

Sinjoro Christian Nielsen el Flensburg preparas por la presado la gramatikon de la lingvo Esperanto por Danoj.

S-ro doktoro K. Běnkovski el Aulie-Ata preparas por la presado plenan vortaron Esperanto-rusan.

La Amerika Filozofia Societo preparas nun plenan historion de la demando pri lingvo tutmonda. Tiu historio, kiu kredebla estas tre interesa, estos preta baldaŭ.

Sinjoro Henri Phillips, sekretario de la Amerika Filozofia Societo, aldonis ankaŭ mallonga tempo la lernolibron de la lingvo Esperanto por Angloj.

### Rekomendo.

Ni rekomendas al ĉiuj amikoj de la muziko la melodiajn kompoziciojn de la sinjoro Fr. Gutmann, bona amiko de nia afero, aparte sian novan pecon: „Der Fischerknabe“ (La fiŝisto-knabo), eldonita 1. por kantado kun fortopiano (kosto 1 marko), 2. por orkestro (kosto 3 markoj), 3. por citro kun kantado (kosto 1 marko), 4. por fortopiano kiel marŝo (kosto 80 pf.) 5. por unu citro (kosto 80 pf.), 6. por du citroj (kosto 1,30 M.). Oni povas ricevi tiujn ĉi verkojn rekte de la komponisto (Frd. Gutmann en Nürnberg, Ludwigstrasse 14). Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto de ĉia lando.

### Peto kaj deziro.

Ĉiujn kunlaboristojn ni petas skribi ĉiam la foliojn de iliaj manuskriptoj nur sur unu paĝo.

La amikoj de nia afero volu aboni je komenco de la nova jaro nian gazeton por unu jaro kaj sendi la necesan monon rekte al la redakcio en Nürnberg. Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto de ĉia lando.

## Anoncoj.

### Anonco.

Senpage instruas la lingvon Esperantan  
Vladimir Vladimirovic de Majnov en S. Peterburg.

### G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de la poŝtsignoj.  
Ĉiuj kasitaj poŝtsignoj estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.  
Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

Jh. Cei